

THE BRITISH ESPERANTIST

(With which is incorporated "The Esperantist.")

The Official Organ of the British Esperanto Association.

VOL^o III^a. N-RO 35.

NOVEMBRO, 1907.

PREZO 3 PENCOJ.

KOSTO DE ABONO, AFRANKITE.

EN GRANDA BRITUJO.

Por unu jaro	3 ŝilingoj.
Unu numero	3 pencoj.

EKSTERLANDE.

Por unu jaro	0.80dol., 4.00fr., 3.00m.
Unu numero	0.07dol., 0.40fr., 0.30 m.
Laŭ Internacia Mono	1.50 Sm.; 13 Sd.

Abonoj estas akceptataj de la komenciĝo de ĉiu monato, kaj poŝmarkoj estas akcepteblaj laŭ efektiva valoro. Sin turni al la Sekretario, 13, Arundel-street, London, W.C.

REDAKCIO.

Manuskriptoj, k.t.p., devas esti sendataj al la Redaktora Komitato, 13, Arundel-street, London, W.C.

Pri artikoloj la Komitato rezervas al si la rajton korekti la erarojn de stilo, k.t.p.

Ordinare oni ne povas resendi artikolojn neakceptitajn.

ANONCOJ.

Pri Anoncoj, sin turni al S-ro. C. A. G. Browne, 53, Wych-street, London, W.C.

ENHAVO.

	PAGO
Al Niaj Legantoj	201
La Kongreso kaj la Brita Gazetaro, H. W. S.	202
Diversaĵoj	203
La Esperantaj Semajnoj, A. CHRISTEN	203
Allandaj Sciigoj, H. W. S.	204
Esperantista Vilaĝo	205
Libraro kaj Gazetaro	206
Answers to Correspondents	209
Chronicle, W. MANN	210
Recent Lectures	214
Vizito al Kingegan, R. H. GEOGHEGAN	215
"Mi Forgesis," H. B. EPSTEIN	217
La Supeto el Stonetoj, J. SCHRÖDER	217
Correspondence	218
B.E.A. New Members, Examinations, &c.	219
F.K.I.	219
Esperanto Classes in London	220

AL NIAJ LEGANTOJ.

La lastajn du numerojn de la gazeto ni devis doni preskaŭ tute al raportoj pri la Kongreso, kaj ni kredas, ke tiuj samideanoj, kiuj havis la privilegion partopreni korpe en tiu Kongreso, ne volus malhelpi al malplifavoritoj ĉeeston spiritan.

Sed dum kongresajo aperis, ne povis aperi kronikajo. Tion ni devis kompensi en ĉi tiu numero: tial la nuna kronikego.

La Literaturo, simile pro la Kongreso iom ne zorgita dum la lastaj numeroj, ankaŭ meritis kompenson, sed ni povis disponi por ĝi nur spacon ankoraŭ malgrandan. Ĝia vico venos kun la proksima numero.

Ĉi tiu numero, kvankam priplendebla pro sia kronikeco, estos, kontraŭe, tre utila propagandilo. Oni rimarku nur la kreskadon persistan de la grupnomaro sur la kovrilo, oni esploru la vastigantan teritorion de la paroladoj propagandaj, oni atentu la multnombrigantan libaron, kaj la plioftigon en la ĉiutaga gazetaro de favoraj aludoj al Esperanto. Utiligu do tiun ĉi numeron da faktoj niaj propagandistoj!

Sed bona propagandisto ne devas nur per faktoj, sed ankaŭ per teorioj pruvi, ne nur per konvinki kaj

esperantistigi la homojn pasivajn, sed ankaŭ por kontraŭstari kaj venki aktivajn malamikojn.

Plie, konante bone la fortan teorian fundamenton de Esperanto, oni ne estos ŝancelata de fungokreskaj (kaj ofte fungopereaj!) reformistoj.

Kaj kie trovi tiujn fundamentajn argumentojn? Ĉu ekzistas ie ia "gvidlibro" de la propagandisto kaj de la defendisto? Jes, ĝi ekzistas, en la "Krestomatio," p. 268, en la artikolo: "Esenco kaj Estonto de la Ideo de Lingvo Internacia." Nun tiu artikolo ankaŭ ekzistas angalingve kaj esperante en aparta broŝuro sespenca: "An International Language: The Problem and its Solution."

Al ĉiu vera samideano ni konsilas atentan trastudon de tiu verko, kaj poste, konstantan al ĝi fidelecon!

Novaj Konkursoj.— La Redaktoro de *La Revuo* sciigis al ni, ke oni intencas starigi en la numero por Novembro serion da ĉiumonataj konkursoj kun premioj: (1a) konkurso literatura, (2a) enketo por voĉdone scii la plej ŝatatan aŭtoron esperantistinon, k.t.p.

LA KONGRESO KAJ LA BRITA GAZETARO.

Iom sciema pri la generala akcepto, kiun Esperanto ricevis de la brita gazetaro, mi prunte prenis la kolekton da eltranĉajoj de la redaktoro.

Da eltranĉajoj, mi malsage kalkulis, ke estos aperintaj kelkaj dekduoj aŭ dudekoj, kaj ke la tuta kolekto konsistas nur el areto da mokaj insultoj. Sed, tiel pri la unua atendo, kiel pri la dua, mi forte eraris.

La redaktoro kompleze sendis ok kajerojn plenajn de eltranĉajoj kaj sufice da aliaj, por plenigi ankoraŭ unu.

Mi komencis pensi, ke la resumo, kiun mi ekintencis fari, ne estos tiel facila tasko, kiel al mi ŝajnis unuavide.

Per feliĉa okazo sur la unua paĝo en la unua kajero estis la jena el la *Weekly Mercury* :—La 13an de Julio, 1907. “ La rapide kreskanta intereso pri Esperanto kuraĝigas nin komenci ĉiusemajnan Esperantan rubrikon.” Tuta kolono sekvas tiun ĉi komencon, plena je lingvaj klarigoj, notoj pri la venonta kongreso, k.a.

Poste estis engluitaj tre favoraj tutkolonaj eltranĉajoj el la *Birmingham Post*, *Birmingham Evening Despatch* kaj *Midland Free Press*.

Sekvis du tri kolonoj el nia entuziasma okcidenta subtenanto, la *Bristol Mercury*, amika presaĵo el *Darlington Echo*, *Liverpool Daily Courier* kaj *Dublin Express*, tre interesa artikolo el la *Manchester City News*, kaj artikoloj el *Newcastle*, *Dundee*, *Edinburgh*, *Hull*, *Bath* kaj aliaj urboj. Kelkaj el ili aperis en negravaj gazetoj, kaj multaj el la potencaj gazetoj, kiuj en urbegoj kuſantaj malproksime de Londono havas en la ĉirkaŭajoj pli grandan influon, ol eĉ la Londonaj gazetoj mem.

Mi frotetis la okulojn kaj miris. Ĉu vere la tuta nacio esperantigas, aŭ ĉu mi nur ekdorme songis.

Sed jen la presaĵo kaj la kajeroj.

Mi kalkulis, ke la kajeroj entenas pli ol 1,000 apartajn eltranĉajojn.

El tiuj ĉi, ĉirkaŭ 100 venis el la plej gravaj Londonaj ĉiutagaj gazetoj.

El tiu ci 100, unu kvarono estas mallongaj kaj la aliaj tri kvaronoj havas longecon de $\frac{1}{4}$ -kolono ĝis tutaj kolono aŭ pli.

Ni memoru, ke la Londona gazeta spaco estas ne senlima kaj treege multvaloras, kaj ke Esperanto estas novajo kaj, almenaŭ ĝis nun, idealaj kaj neprofitema afero.

Eble estus bone, ke ni malprecize kalkulu, kiom da tia spaco ni ricevis. Antaŭ mi okaze kuſas ekzemplero de la *Daily News*. La paĝo estas sep-kolona, kaj ĉiu kolono havas la longecon de du futoj proksimume.

Kalkulante, ke la aliaj gazetoj havas pli-malpli la saman grandecon, ni povas konstati ke, antaŭ dum kaj post la kongreso, *The Tribune* apartigis al Esperanto unu tutan paĝon, *The Daily News*, *Daily Mail*, *The Times*, *The Telegraph* kaj *The Standard* unu duonon de la tuta paĝo, kaj *The Express*, *The Morning Post* nur iom malpli. *The Evening Standard* antaŭ donis bonan raporton. Ni devas do senti nur grandan dankecon al la tuta Londona gazetaro, kiu tiel malavare interesigis pri nia afero.

Krom la Londonaj kaj lokaj gazetoj, tre favoraj leteroj aŭ aliaj presaĵoj aperis en la ĉefaj medicinaj jurnaloj, *The Lancet* kaj *The Medical Times*. En modaj gazetoj, kiel *The Queen* kaj *The Lady*, oni trovas tre favorajn artikolojn, kaj la saman senpartiecon

montris pure fakaj gazetoj, kiel *The English Mechanic*, *The Milky Way*, *The Postman's Gazette* kaj *The Times Engineering Supplement*, ankaŭ la instruistaj gazetoj, ekzemple, *School* kaj *The Educational Times*, kaj inter la religiaj, *The Record* kaj *Sunday School Chronicle* (kun bonegaj artikoloj de D-ro Mayor el Cambridge), *The Christian World* kaj *The Jewish Chronicle* (kun tre detala biografia artikolo pri nia Majstro).

En la granda aro da gazetoj, se oni renkontas kontraŭecon, tio estas plej ofte en formo de “letero al la redaktoro.”

Ni kelkfoje renkontas unu aŭ alian de niaj malnovaj konatoj, ekzemple: Esperanto disfalos en dialektoj; estas ne tute simila al la angla lingvo; havas akuzativon; estas kontraŭ la patriota sento; celas detru la naciajn lingvojn; ne estas tuj komprenebla; estas artefarita kaj kontraŭ la naturo, kaj tial malsukcesos.

Sed estas mirinde, kiel tre malofte oni renkontas eĉ tiun ĉi antikvan babilodon kaj, kiam oni ĝin renkontas tio ne estas malgentile aŭ moke skribita, sed serioze kaj argumente.

Ankaŭ la skribisto plej ofte, kaj post tre mallonga tempo ricevas taŭgajn respondeojn de Esperantistoj, kaj, ĉar la gazetoj estas tute pretaj aŭskulti la Esperantajn argumentojn, ni ne bezonas deziri ion pli bona.

Eĉ la grava Londona gazeto *The Daily Telegraph*, responde al kelkaj diraĵoj aperintaj en la gazeto, presigis bonajn respondeojn de niaj samideanoj, ekzemple, unu de nia fervora svisa amiko S-ro René de Saussure.

Pri la spaco donita al nia afero ni jam sufice parolis, kaj nun konvenas, ke ni iom pripensu ne nur la kvanton sed ankaŭ la kvaliton.

Ĉu la gazetoj aprobas aŭ malaprobas nian aferon, ĉu ĝi estas por ili saĝa aŭ malsaga?

Estas ne facile en malmultaj vortoj fari ĝustan resumon de longaj artikoloj verkitaj de diversaj vidpunktoj. Sed entute estas mia propra opinio, ke ni devas esti tute kontentaj, pli ol kontentaj, rilate al la sintenado de la brita gazetaro. Ni devas esti eĉ tre dankaj, ĉar multaj malkaſe, eĉ entuziasme subtenas nin, kaj la ceteraj, se ili estas ne ankoraŭ amikoj, certe ne estas agemaj aŭ akraj malamikoj.

Vere estas, ke kelkaj gazetoj serĉis en la kongreso iom da humoraĵo, kaj pli-malpli trovis ĝin inter la centoj da homoj, kiuj, alveninte el la plej malproksimaj lokoj en la tuta terglobo, montris nekutimajn morojn kaj portis nekutimajn vestojn, kaj kiuj, ankaŭ oni povas aldoni, estis kunvenintaj por celi tute neordinaran celon.

Sed tio ĉi estis la sola profito, kiun la gazetistoj povis atendi el ni kaj el nia afero, kaj ni ne devas domagi ĝin al ili. Cetere, tia humoraĵo estis tute bonkora kaj sensofenda laŭ intenco.

Vere estas ankaŭ, ke *The Times* ne entuziasmiĝis subite pri Esperanto, sed tiu ĉi gazeto, kiun oni ankoraŭ povas nomi la plej grava brita gazeto, traktis pri Esperanto en maniero tute respektplena. La plej malbona punkto en tuta kolono estis ja iom solena kaj malgoja antaŭdiro, ke nia plena sukceso estas treege duba, aŭ eĉ neebla.

Generale oni serĉus vane la noton de insulta mokado aŭ ofenda malestimo tra la tuta gazetaro.

Kaj tio ĉi estas des pli mirinda, ĉar multaj el niaj plej fervoraj amikoj povas memori la pasintan tempon, en kiu ili mem plene opiniis, ke Esperanto estas pura frenezajo.

La ideo starigi novan artefaritan lingvon kajigi la tutan mondron lerni ĝin certe ne estas, unuavide, tre esperplena entrepreno.

Tial, mi diras denove, ke la tuta gazeta agado pri Esperanto kaj pri la kongreso estas tute bona kaj laŭdinda.

Samtempe ni rajtas esti iom fieraj pri la fortamovado nun firme starigita en nia patrujo.

La gazetoj malofte ion kreas, aŭ eĉ subtenas. Ili plejparte estas kronikistoj de aferoj, kiuj jam ekzistas, de agoj jam faritaj, kaj de movadoj, kiuj jam sukcesis.

Ni ŝuldas, do, la nunan sukceson unue al la genio de la glora elpensinto de tia granda donaco, kiu sola starigis la verdan standardon, kaj due, ni ŝuldas ĝin al la ofte nekonataj, senlacaj esperantistaj manoj, kiu starigis ĝin poste en nova urbo, nova vilaĝo, aŭ eĉ en nova domo.

Ni bone kajbaldaŭe sukcesos, sekante la ekzemplon de nia angla prezidanto, kies nomo tiel ofte aperas tra tiuj ĉi libroj, kiel kondukanto de la standardo en novajn urbojn kaj urbegojn, kaj eĉ trans novajn marojn, kie antaŭe ĝi ne flirtadis.

Fine eĉ tiu ĉi mallonga skizeto maltaŭge finiĝus sen cito de la *Review of Reviews*, kiu nuntempe, kiel ĉiam antaŭe, forte kaj malavare antaŭenpuŝas Esperanton. Ĉu redaktoro havas almenaŭ la plezuron (eble ne por la unua fojo en sia vivo) vidi la tutan gazetaron alproksimiĝantan al la vidpunkto, kie li staris preskaŭ la sola advokato.

H. W. S.

DIVERSAJOJ.

Kontraŭ - Alkoholistoj. — Ĉi tiu jara kunveno okazis je merkredo, la 14 Aŭgusto, en la Granda Konsilejo de la Urbdomo en Kejmbrig. S-ro Sims Woodhead, profesoro ĉe la Universitato de Kejmbrig, prezidis. La oficistoj elektiĝis jene:—Prezidanto, Rektoro Boirac, de la Universitato de Dijon; kasisto, Profesoro Sims Woodhead, de la Universitato de Kejmbrig; sekretario, S-ro W. C. Amery, Temperance Hall, Birmingham; kaj vico-prezidanto, Profesoro Mayor, Kejmbrig Universitato, kune kun eminentuloj el Hispanujo, Holando, Svedujo, Norvegujo, Svisujo, Germanujo, Francujo, Skotlando, Kimrujo, k.t.p. La reguloj estis legitaj kaj unuvoće aprobitaj, kun longa raporto farita de la sekretario, kiu interalie raportis pri multaj paroladoj faritaj de si, pri la fondo de multaj grupoj esperantaj, la dissemo de kontraŭ-alkoholista literaturo, la korespondado kun la Brita Registaro rilate al la malpermesso de la vendo de biero al la Transvaal' aj indigenuloj, kaj kontraŭ-alkoholista instruado en lernejoj. Li ankaŭ raportis, ke post la Geneva Kongreso oni malpermesis la vendon de absinto en du el la Svisaj kantonoj; ke la sama propono estas prezentita al la Franca Registaro; ke, en Svedujo, fariĝis projekto, malpermessante, post iom da tempo, la fabrikadon kaj vendon de ebriigajoj; la "Unua Ĉambro" (tio estas, tiu parto de la parlamento kiu konsistas el la ordinaraj membroj) konsentis; kaj en Islando ekzistas nur sep trinkejoj, kaj en 1908a la logantoj, balote, devos decidi, eĉ jes aŭ ne, la vendo de alkoholajoj devas esti malpermesata.

Blinduloj. — La antaŭ ne longe fondita grupo, la "Norda Stelo," jam, laŭ la propono de la Blindula fako de la Kongreso, serĉis kaj eltrovis blindulinon kiu logas en ĝia kvartalo. Estas aranĝite, ke si alvenos al

la ĉiusemajnaj kunvenoj de la grupo kaj, krom tio, ke ano donos al ŝi ĉiusemajnajn lecionojn en ŝia domo.

Kristanaj Celantoj. — S-ro A. M. Wheeler, la kunvenestro de la K. C. Sekcio ĉe la Kongreso, diras, ke laŭ la decido jam farita, li skribis diversajn leterojn, kaj ricevis multajn respondeojn de Esperantistigemaj samcelanoj. Li ankaŭ ricevis de la redaktoro de la *Christian Endeavour World* promeson, enpresigi en tiun ĵurnalon liajn leterojn kaj sciigojn. Tiu ĵurnalero jam enskribigis 1,100 Esperantistajn Kristanajn Celantojn. Kial do ne formi tutmondan societon por Celantoj, kiel oni proponis?

LA "ESPERANTAJ SEMAJNOJ."

Eble kelkaj el niaj samideahoj en diversaj partoj de la lando deziras scii ion oficialan pri la progreso de tiu ĉi movado.

Al miaj juliaj cirkuleroj mi ricevis respondeojn de ĉirkau 40 grupoj, la plimulto el kiuj deziris organizi "Esperantajn Semajnojn." Kelkaj aliaj aprobis la ideon sed dubis la sukceson de la afero; ses el la respondintoj simple rifuzis. Sajnas al mi, ke la kaŭzo de dabo kaj rifuzo venas de malkomprendo kaj, sekve, de malkredo pri la ebleco fari tion, kion mi promesas. Nu, la dubuloj havas tempon por sendubiĝi.

Mi komencis mian aŭtunan klopodon en Bradford 700 ĉeestantoj, 34 lernantoj; poste sekvis St. Helens, 300 ĉeestantoj, 12 lernantoj; Harrogate, 900 ĉeestantoj, 60 lernantoj; Hull, 600 ĉeestantoj, 48 lernantoj; kaj, laste sed ne malplej grave, Edinburgh, 1,000 ĉeestantoj, 200 lernantoj.

La moralaj rezultatoj de tiu kvinsemajna laboro estas ne malSATINDA, ĉar, krom la vere flata entuziasmo de grandaj aŭdantaroj ĉe la enkondukaj paroladoj, oni devas memori, ke ĉie la ĵurnaloj multe kaj favorege pripipolis la aferon; plue, ni povas esperi, ke la nombro da lernantoj, kiu aliĝis al la semajna kurso, estas superata de la nombro da konvertuloj, kiuj intencas lerni la lingvon private aŭ en la ordinara kursoj. Tion mi deprenas de la fakteto, ke en ĉiu urbo mi vendis multe pli da lernolibroj, ol mi havis da studantoj, ĝenerale 2-3 fojojn pli; sed la financa rezultato en la kvar unuaj lokoj estas bedaŭrinde ne tiel kontentiga. Oni ne forgesu, ke la elspezoj ĉiaspecaj estas tiel grandaj, ke malpli ol 100 studantoj en ia urbo kaŭzas monperdon. Tamen, tiuj, kiuj aliĝis al la tutaj kursoj en ĉiu urbo montriĝis tiel entuziasmaj, ke mi ne povas dubi pri la fina financa sukceso de la afero. Kuragigan pruvon pri tio donis Darlington, Middlesbrough kaj Stockton en la printempo, kaj Edinburgh en Oktobro.

Estontaj "Esperantaj Semajnoj" estas aranĝitaj: Okt. 28an ĝis Nov. 1an, NEWCASTLE; 4-8an Nov., WISBECH; 11-15an Nov., LUTON; 18-22an Nov., BEDFORD; 9-13an Dec., DOVER. Por la organizado de la Wisbech'a kurso Fratino Peckover, fratino de Lord Peckover, memvole oferis £5! Iru kaj faru same! Ĉiam antaŭen!

A. CHRISTEN.

Serial Lessons in Newspapers. — Dr. O'Connor informs us that lessons prepared by him are now appearing in *The South Wales Argus*, *Manchester City News*, *Dumfries Standard*, *Wells Journal*, *Somerset and West of England Advertiser*, *Munster News*, *Uttexeter New Era*, and *The Bournemouth Observer*.

ALILANDAJ SCIIGOJ.

Ameriko.—La *Evansville Courier* anoncas, ke la "Indiana" Asocio, kiu antaŭ ne longe ne ekzistis, nun kalkulas 500 membrojn. La energio prezidanto estas S.-ino Stoner. La Amerika Esperantista Asocio, kiu nun havas kelkcentojn da anoj kaj tridek kvin grupojn, decidis starigi ekzamenon por la "Atesto pri kapableco," kaj la *Philadelphia Esp. Society* jus preparis ekzamenan demandaron por la "Atesto pri lernado"; sekretario, E. Clive Hammond, 1711, Summer-street. Kiam ni vidas tian grandan sukceson en Ameriko, kaj ankaŭ egalan sukceson en Japanujo, ŝajnas kvazaŭ la Eŭropaj nacioj devas uzi ĉiujn siajn fortojn, se ili ne volas cedi la plej altan rangon en la Esperantista movado al niaj plej malproksimaj amikoj.

Brazilujo.—La unua Brazila Kongreso de Esperanto (Julio 12-19) estis honorata per la ĉeesto de la Ministro por Internaj Aferoj, kiu prezidis la malferman kunsidon. Oni starigis la plenan regularon de la "Brazila Esperantista Ligo," kiu estonte funkciados rilate al ĉiuj naciaj aferoj. Tiamaniere, sub la plej esperplenaj aǔspicioj la Brazila Ligo eniras la rondon de la aliaj naciaj societoj.

Danujo.—En Odense'o, kie antaŭ Julio ne troviĝis unu Esperantisto, nun estas unuigita, kiu enhavas 100 membrojn, dank' al klopodoj de S.-ro kand. mag. Carlsen. S.-ro Vald Petersen, estro de la komerca lernejo, malfermis la pordojn de la lernejo al la mondilingvo, kaj baldaŭ la seminario sekvis la bonan ekzempon de la lernejo.

Francujo.—Cent dudek kvin delegitoj el diversaj anglaj urboj vizitis Lionon (Lyons) kaj estis kvin tagojn inde gastigataj de la urbestraro. La sola ombro sur okazo alie gaja kaj ĝuebla estis la lingva malfacilajo, kiun aro da plej bonaj tradukistoj ne povis tute forigi. Lord Provost Gibson, urbestro de Edinburgo, ĉe intervidigo inter la delegitoj kaj la Liona Esperantista Grupo, anoncis, ke li lernos la lingvon kaj laŭpove favoros la Esperantan movadon. La francaj farmaciistoj komencas internacion laboron preparante teĥnikan vortaron. La franca komitato estas S.-ro Boison (prezidanto de la Generala Sindikato de Francaj Farmaciistoj) kaj S.-roj Peloille, Série kaj Rousseau. Ni eksiciis kun plezuro, ke la grava ĉiutaga gazeto de la fame konata polemikisto Henri Rochefort, *L'Intransigeant*, de nun publikigas regule artikolojn en Esperanto. Ĉiu Esperantisto, kiu abonas la gazeton, ricevos senpagan premion. La redakcia adreso estas: 142, rue Montmartre, Paris.

Germanlingvaj Landoj.—BAD NAUHEIM.—Post la kongreso, D.-ro Zamenhof restadis kelkan tempon tie ĉi por uzi la sanigajn akvojn. Dum festeno en la bela salono "Teichhaus," parolis D.-ro Fulda, S.-ro Mangelsdorf kaj D.-ro Strecker. D.-ro Zamenhof esprimis sian ĝojon pri ekzisto de grupo en la fame konata banejo. Poste 60 personoj vespermangis en "Teichhaus" kaj laŭ propono de D.-ro Mybs la ĉestantoj garantiis 500 markojn por la venonta kongreso en Germanujo. Antaŭ ol finiĝis la monato Oktobro sumo de 3,000 markoj estis garantiita.

La FRANKFURT'a grupo havis la grandan plezuron akcepti D.-ron Zamenhof la 15an de Septembro. S.-ro Küchler prezidis kaj Prof. Staudinger faris spritan paroladon pri la taǔgeco de Esperanto ne nur por la ĉiutaga vivo sed ankaŭ por la scienco. D.-ro Zamenhof en entuziasmiga parolado esprimis sian grandan ĝojon pri la videblaj progresoj de Esperanto en Frankfurt dum la pasinta jaro. "Germanaj Esperantistoj

ne maltrankviliĝu pro la nun tre vivaj atakoj kontraŭ nia lingvo." "Ne estis alie en Francujo, kiam tie Esperanto komencis disvastiĝi." "Kun fido kaj espero la Germanoj preparu la kvaran kongreson!" Ĉeestis ankaŭ S.-ro Gaston Moch, reveninte de la Pacifista Kongreso en München, kie oni atingis decidojn tre favorajn por Esperanto. D.-ro Hanauer kore salutis la eminentan Esperantiston al kies klopodoj oni precipe ŝuldas la diritajn decidojn. S.-ro Moch respondis per elokventega parolado, kiu ekvekis la plej grandan intereson.

MUNHENO.—La 16a Internacia Kongreso Pacifista, en sia ferma kunsido, la 14an de Septembro, akceptis tri gravajn proponojn pri Esperanto:—

1. La kongreso aǔdis kun kontentego, ke tridek kvin pacsocietoj sciigis la "Internacian Oficejon en Berno," ke ili estas pretaj korespondi esperante. La kongreso rekomendas tiun ĉi ekzemplon al la aliaj societoj kaj esprimas la deziron, ke en estonteco tiuj societoj, kiuj korespondas esperante, estos stelsignataj en la listo de la societoj por pacmovado.

2. Rilate al la deziresprimo akceptita de la unua Mondpackongreso (koncerne internacion helplingvon) kaj la deziresprimoj akceptitaj de la 9a kaj de la 14a kongreso, la 16a kongreso esprimas ladeziron, ke Esperanto estu instruata en la lernejoj kiel internacia helpa lingvo, kaj ke la Berna Oficejo sciigu tiun ĉi deziron al la registroj.

3. Por malmulti la grandajn malfacilajojn kaj tempoperdojn, kiuj naskiĝas al la kongresoj internaciaj per la diverseco de la lingvoj kaj kiuj, malgraŭ ĉiuj aliformadoj de la reguloj ĝis nun akceptitaj, tiel peze ŝargas la Packongresojn, la kongreso decidis, ke de la proksima kongreso Esperanto povas esti uzota dum la kunsidoj (kaj ke la paroladoj ne farataj en Esperanto nur estos tradukataj en tiun ĉi lingvon).

La du unuajn proponojn la kongreso akceptis kun granda plimulto. La tria propono, farita de la Profesoroj A. Schmidt kaj W. Förster, kaŭzis grandan disputon, ĉar la reguloj de la kongreso per ĝi estus ŝangotaj. S.-ro Molenaar estis granda kontraŭulo, proponante, ke oni restu neŭtrala rilate al la elektata lingvo, sed Prof. Förster bonege respondis, S.-roj Moscheles, Moch kaj G. Arnhold ĝin forte subtenis. Fine S.-ro Lafontaine konsilis voĉdoni pri la propono en du partoj. Oni akceptis la unuan parton ĝis "dum la kunsidoj" kaj malakceptis la duan. La granda kongreso de la Esperanta afero estas do klare videbla, la Esperantistoj povas esti kontentaj. En la daturo de la kongreso ne pasis unu festo aǔ kunsido, en kiu oni ne aǔdis la vorton, Esperanto. Ekzemple, je la granda festo en la "Münchener Kindelkeller" antaŭ preskaŭ 5,000 personoj S.-ro Gaston Moch paroladis por Esperanto kun granda aplaudo. Dum festa ekskurso la Dresdena delegito disdonis du cent diverslingvajn ŝlosilojn, kiujn oni atente studis.—El "Lingvo Internacia" kaj "Germana Esperantisto."

Hindujo.—La sekretario de la Esp. grupo en "Surat" sendas la ĵurnalon nomata *Apakshapata* aǔ *The Impartial*. La redaktoro estas D.-ro Dinshah Ghadiali, kaj li nun apartigas kolonon por Esperanto. Aliaparte, la ĵurnalo estas redaktita angle kaj "gujrate." Kiel angloj eble ni devas iom krieti sub la senkompataj batoj de la angla parto, kiun la redaktoro nomas "Our Golden Whip" (nia ora viro), sed alveninte al la Esperanta parto ni povas ree sin senti en amika interkonsento. Per *La Stelo de l'Oriente*, eldonata de la *Esperanto Society of India*, ni ekscias, ke grupo estas

organizita en Naini Tal de S-ro Oertel, kiu autaue tiele bone laboradis en Agra; ankaue en Roorkee oni fondas grupon, dank' al la klopodoj de nia fervora amiko Kolonelo H. H. Hart, el Srinigar, Kašmiro. La grupoj en Agra, sub la direkto de S-ro Smith, kaj en Rawalpindi, sub la direkto de Kapitano Tacchi, kvieta progresadas. En Travancore, Pastro Emlyn ankoraue propagandas entuziasme.

Malta.—La *Malta Herald* enhavas longan raporton pri la sukcesega festo, koncerto kaj eksposicio, kiu okazis en la "Concert Hall" ĉe "Sliema." Oni povas kore gratuli D-ron Busittil (Prez.) kaj S-ron Tancred Gouder (Vic-prez.) pri la granda sukceso. La okazo estis la XX-a datreveno de la publikigo de Esperanto. Pli ol 500 personoj ĉeestis, vigle interparolante kaj demandante klarigojn pri la propagandiloj al ili disdonitaj. Aperis ankaue en sama gazeto, interesplena angla traduko de la "Historio de Esperanto" el la gazeto "Esperanto," farita de D-ro Busittil.

Hinujo.—Laŭ eltranĉajo el la *South China Morning Post* sendita de Staba Serĝento W. Ruse, la altranga Kantona Hino, Lia Ekselenco Tang Shao Yi interesigas pri Esperanto. Vere estas, ke Lia Mosto tute ne kutimas montri sin afabla rilate al okidentaj novajoj, sed dum siaj veturnadoj ŝajne li interesigis pri la utilaĵoj de nia lingvo kaj aĉetis leg- kaj lerno-librojn.

Suisujo.—La 21an kaj 22an de Septembro okazis en Berno, kun plena sukceso, la 5a generala kunveno de Svisa Esperantista Societo (S.E.S.). La sabaton posttagmeze estis dediĉata al la ekzamenoj por supera diplomo de Esperanto, la unuaj, kiuj organizis S.E.S.. La provoj konsistas el traduko de franca teksto en Esperanton; la verko de Esperanta rakonto laŭ altruditita temo; la lego kaj traduko de Esperanto paĝo, sekvata de interparolado pri ĝi kun la ekzamenisto; provaj demandoj por eltrovi la konon de la kandidato pri la historio kaj nuna stato de la lingvo; kaj, fine, la ekzamenato devas fari praktikan lecionon, por montri sian kapablon instrui Esperanton. Dek du el la dek kvin kandidatoj, kiuj sin prezentis, akiris la deziritan diplomon kaj, pro tio, havas la rajton organizi ekzamenojn por la "Atesto pri lernado" en siaj proprej urboj. La dimancon, sub la prezido de Pastro Schneeberger, prezidanto de S.E.S., okazis la generala kunsido, kun diversaj oficialaj raportoj, reelektio de la ĝistama komitato, parolado de S-ro R. de Saussure pri la helpa monsistemo, k.t.p. Post la kunsido gaja tagmango kunigis la samideanojn, kiuj finis la feston promenante kaj vizitante la vidindaĵojn de la svisa urbo.— "Lingvo Internacia" kaj D-ro Renard.

Samos (Azia Turkjo).—S-ro A. Stamotiades, la prezidanto, sciigas al ni, ke la Esperantista Societo tie ĉi fine recevis la oficialan aprobon de la nova Princo de Samos, lia mosto Georgo Fil Georgiades. La sekretario estas S-ro Herakles N. Nikolaidis, "eforo," t.e. konsulo, Raoul Domino, mara agento. Ni esperas, ke de nun la malkompreniĝo pri la societo, nome, ke ĝi okupas sin je nova religio, k.t.p., ĉesiĝos kaj tiel la societanoj povos ree kolektiĝi libere, sen timo esti prenitaj kiel "herezuloj aŭ ribeloj."

Ceylon.—La urbo Galle nun havas Esperantistan Societon, fonditan en la mezo de la monato Septembro. La prezidanto estas S-ro F. H. de Vos, la sekretario S-ro E. Gooneratne.

Kanado.—La unua kunveno de la Toronto Klubo Esperantista okazis la 21an de Septembro, kiam ĉirkaŭ 25 klubanoj de lasta jaro, kune kun 25 sciemuloj, kunvenis en "Beacon Hall, Forum Building." Oni arangis kurson, kiu komenciĝis la sekvantan sabaton. La tre konata firmo, Vannevar kaj Kompanio, nun vendas Esperantajn librojn kaj havas, ekstere de sia magazeno, grandan surskribajon anoncantan la vendon. Tiu ĉi firma estas fama pro siaj kolegiaj kaj universitataj libroj. Oni atendas grandan sukceson en Toronto tiun ĉi vintron kaj esperas povи havi du klasojn antau la printempo.

Tutmonda Disvastigado de Esperanto.—Kiam malamikoj diras al ni "Via afero ne povas atingi sukceson," ni havas argumenton, kiu estas multe pli konvinka, ol ia teoria argumento, nome: "Nia afero jam sukcessis kaj ĉiutage faras pli grandan sukceson." Jen tabelo oficiale eldonita de la Esperantista Centra Oficejo, Parizo.

	Januaro, 1905.	30 Junio, 1907.
Ĉiuspecaj Esperantaj Societoj ..	188	639
Profesiaj kaj fakaj societoj ..	8	61
Esperanta gazetaro ..	22	38
Naciaj gazetoj, havantaj kronikojn en Esperanto ..	8	19
Kongresoj, kiuj akceptas aŭ rekomendas la uzon de Esperanto ..	2	11
Societoj, kiuj korespondas en Esperanto ..	0	40

Esperplena ankaue estas la fakteto, ke oni povas vidi je la fino de ĉiu duonjaro, ke ne nur la nombro fariĝas pli grandaj, sed ankaue la proporcio akcela movado rapide pligrandiĝas. Ni povas esti fieraj pro tio, ke Grand-Britujo povas kalkuli 103 Esperantistajn societojn. Inter la aliaj nacioj nur Francujo (kalkulante 156) hodiau superas nin. La tria honora loko apartenas al Nord-Ameriko, kie ekzistas 52 societoj, sed rilate al la akcela proporcio la plej alta loko apartenas al ĝi, ĉar ili komence kalkulis nur 3. En tiu ĉi amika konkursa Hispanujo montras sin inda konkuranto, ĉar, dum la diritaj jaroj, la nombro de la hispanaj societoj kreskis el 3 ĝis 40. Plue, en 170 urboj kaj urbegoj tra la mondo troviĝas Esperantaj konsulejoj, kies utilo al veturantaj aferistoj aŭ al turistoj estas nekalkulebla.

H. W. S.

ESPERANTISTA VILAĜO.

Al la Redaktoro de THE BRITISH ESPERANTIST.

Je la 15a kaj 16a de Aŭgusto, 1907, okazis, en la Guildhall, Cambridge, du kunvenoj, en kiuj prezidis Profesoro C. Aymonier, el Paris, por starigi vilaĝon kiel Esperantistujon. Oni elektos belan kaj taŭgan vilaĝon en la proksimeco de la 1908a kongresurbo, kie Esperantistoj el ĉiuj landoj povos pasigi siajn libertempajn monatojn, per interparolado, k.t.p., kiu perfektigos ilin en la praktikado de la lingvo. Poste mi skribos detalojn pri la projekto.

Nun mankos mono por la dissendado de cirkulerojn, k.t.p. Ĉu iu volas doni monon por helpi tiun dezirindan projekton? Mi danke volas ricevi eĉ malgrandajn donacojn aŭ kotizajojn—ekz. 0·50sm. (unu ŝilingo)—por la elspezoj de tiu afero.

SIDNEY WHITAKER, M.D.

Sekretario kaj kasisto, Waterloo, Liverpool.

LIBRARO KAJ GAZETARO.

Imenlago, Tradukita de Alfred Bader el la Germana de Theodor Storm.—La rememoroj de maljunulo pri sia vivhistorio. Ĝi estas rakonto bone disolvita pri la amo kaj animo de poeto, kiu maltrafas sian celon, jen en la serĉo de fragoj, jen en pli grava afero. Nur pri kelkaj punktoj ni malkonsentas la lingvaĵon de la tradukanto, kiu cetere estas bonega. Sed, se la radiko *kontrakt-* donas la sencon de interkonsento pri io farota kontraŭ valora rekompenco, kiel oni povas kompreni la frazon: "Tie ĉi li kontraktis multajn novajn kamaradligojn kun knaboj de sia aĝo"? Ĉe la frazo: "Nun ili returnis; ili ĉeestis serĉi fragojn" ni vane serĉas *kion* nome ili returnis, kaj *kiun* ili ĉeestis serĉi?—A. E. W.

Tri Tradukoj de L. E. Meier: (1) *La Monahejo ĉe Sendomir*, de Franz Grillparzer; (2) *Edziĝa Festo en Capri*, novelo de Paul Heyse; (3) *Ama Vivo en la Naturo*, de Wilhelm Bölsche.—Tri ĉarmaj libretoj, kiuj bone repagos la laboron de legado; tamen ni plimulte povas rekomenadi ilin pro interesa enhavo, ol kiel modelojn de lingva stilo. Tiu ĉi ne estas entute malbona, kontraŭe ni trovas ĝin plejparte bona; tamen ni trovas multajn esprimojn, kiujn bedaŭrinde ni ne povas rekomenadi por imitado. En tio ni ne aludas la skribararojn kaj preserarojn, kiuj grandanombre staras (ekz.: gojigante, fingero, kosento, rebeloj, konfusita, k.t.p.), sed esprimojn, kiuj ŝajnas al ni kontraŭaj al la spirito de la lingvo. Ekzemple, sur p. 8. de "Monahejo" ni trovas duopajn komplementojn al unu sama verbo en la frazo: "la pordisto enirigis *ilin* la vastan gastocambron"; sur p. 17: "Varma, mola mano ekpremis *sian*"; sur p. 20: "li kaj *siaj* du filoj"; sur p. 27: "si ekploris kaj volis ĵeti sin antaŭ *siaj* piedoj"; sur p. 45: "La tempo de vespermango alveninte, Staršenski diris, ke . . ." k.t.p. Kelkaj vortoj strange uzataj ankaŭ eble maltrankviligus nespertan leganton, kiel ekzemple: "tiu ĉi gustatempe estis *pruvinta* *donacema* kontraŭ *li*", "Frato!" *intermitigis* la monaĥo," k.t.p.—A. E. W.

Nauilingva Etimologia Leksikono de la Lingvo Esperanto, de Louis Bastien.—Diras la aŭtoro: "Tiu ĉi laboro estas vere neperfekta." Tiom pli bone, ĉar ni opinias, ke la aŭtoro pli zorgas pri la *fidindeco*, ol pri la *pleneco* de sia verko. Por tiuj verkoj la esperanta literaturo havas suficegon da loko! La libro estas aranĝita laŭ la alfabeto ordo de la Esperantaj radikoj troveblaj en la *Universala Vortaro*, kaj kontraŭ ĉiu radiko, en kolonoj dediĉitaj al ok naciaj lingvoj (latina, franca, itala, hispana, portugala, germana, angla, rusa) oni enskribis la samsencan vorton, kiam en tiu ĉi sin retrovas la esperanta radiko; se ne, oni penis serĉi nacian vorton enhavantan tiun saman radikon, kiam en tiu ĉi oni povas pli-malpli retrovi la sencon de la esperanta radiko. La verko nek pretendas nek celas difini la akceptitan signifon de niaj fundamentaj vortoj, sed ĝi praktike elmontras la veran internaciecon de niaj elementoj, pravigas la sciencan metodon de la elpensinto de nia lingvo, instruas pri la principoj konvenaj por tiuj, kiuj havos okazon serĉi novajn radikojn, prezentas interesegan materialon por tiuj, kiuj jam interesigas pri filologaj demandoj, aŭ kiuj, kiel instruantoj, devas kvietigi la scivolecon de siaj lernantoj, kaj konstante rememorigas la leganton pri la esenca parenceco de la homa familio. Se ĝi estas "neperfekta," tiu konfeso mem ĉe la aŭtoro.

espereble kondukos al ĝia estonta perfektigado per la helpo de ĝiaj kleraj legantoj.—A. E. W.

La Faraono, de B. Prus, tradukita de K. Bein el la pola lingvo, unua volumo.—Nur legi tiun ĉi novelon estas legi en la antikva historio de Egiptujo; legi ĝin atente estas vivi inter la antikvaj egiptoj kaj miksiĝi en ilia ĉiutaga vivo, kompreneble sen la privilegio meti al ili scivolemajn demandojn, tamen sen la devigo suferi kun ili la tiranecon de la regnestraro kaj egale sen zorgo pri malplena regna kaso, pri minac-dantaj eksterlandaj malamikoj kaj pri internaj intrigoj. Kvazaŭ per siaj propraj okuloj oni rigardas la lokojn, personojn kaj agojn de tiu ĉi drameca prozpoemo; oni ĉeestas en la kunsidoj de princoj kaj en la sekretaj konklavoj de pastroj; oni simpatias en la malfacilaj situacioj de la kronprinco kaj en la malgaja sorte de la depremita kamparano. Ĉion oni rigardas de kelkaj vidpunktoj, de alte, de sube, ambaŭflanke kaj eĉ dorse. Tiun ŝajnon de realeco sentatan de la leganto li ŝuldas ne sole al la aŭtoro, ĉar grande parto prenas en la plezuriga iluzio la lerteco de tradukinto, kiu tiel bone scias fleksi al sia volo la ekzistantajn provizajojn de nia lingvo. Cetere li donacis al ni kelkajn tre utilajn novajn vortojn, pri kies generala akcepto la praktika verdikto de la esperantistaro montrös la sorton, unuatempa per diskutado, sed fine kaj efektive per la simpla fakto de uzado aŭ neuzado.

Vortojn, kiuj propre apartenas al la historia epoko aŭ aŭ Egiptujaj lando kaj moroj, ni trovas la sekvantajn: **aŭtohtona** (7, 36); **feniolo** (56, 3); **hamelino** (34, 34); **katarakto** (83, 21). Tiu ĉi vorto ŝajne havas propran rajton, ĉar en antikvaj tempoj oni kreis ĝin precize por nomi la kataraktojn de la Nilo, tamen en Esperanto ĝi havis ĝis nun nur la medicinan signifon. Ŝajnas al ni, ke la duobla signifo neniel povas naski embarasojn.) ; **kuĉero** (158, 21; eble preseraro por *kuſero*, ceremonia preparisto de mangajoj); **kuĉera** (63, 7); **mago** (146, 12); **nomarho** (9, 13); **nomeso** (59, 7); **parasito** (75, 35); **pilone** (38, 15); **pello** (137, 5); **utono** (18, 22).

Novajn vortojn generale uzeblajn ni trovas: **allanco** (149, 3); **avanco** (47, 20); **balleto** (19, 6); **baobabo** (24, 1); **dekado** (84, 36; 124, 11; 132, 29; ĉiuokaze laŭ la franca senco: *deko da tagoj*, ne laŭ la angla: *deko da jaroj*); **takelo** (39, 25); **fono** (5, 22); **incenso** (8, 8); **inkrusti** (50, 9; ankaŭ trovebla en la *Vocabulaire Technique* de Ch. Verax); **irigacio** (124, 31); **jura** (90, 2); **konkubino** (40, 15); **libertinismo** (99, 1); **marodero** (13, 7); **megero** (t.e. *furia*, 117, 27); **oponi** (66, 15; 67, 25; 81, 18); **prestigo** (81, 13); **seno** (62, 21; 114, 26); **seneso** (154, 5; sed kian kreskajon ĝi nomas?); **silomoro** (10, 37); **spektatoro** (12, 22; kial ne *rigardanto*?); **transversa** (19, 11; ankaŭ en *Vocabulaire Technique*).

Vortoj, al kiuj la tradukinto donis signifon pli aŭ malpli novan: **etago** (kiel mezuro de grando, 6, 39); **fanatiko** (por *fanatikulo*, 131, 13); **gruo** (la aparato, 13, 34. La vorto *argano* estas jam proponita.); **nobia** (eble preseraro por *nobela*, 50, 8; 98, 9); **pupilo** (52, 14, spiono; 142, 8, sendito; 147, 32, disciplo; tamen en *Universala Vortaro* ĝi rilatas nur la okulon); **si** (84, 36); **spektro** (146, 31; sendube erareto por *sceptro*).

Vortoj, en kiuj la tradukinto malsatis malnove akceptitajn radikojn, farante novajn. Kredeble kelkaj el ili estas nur preseraroj: **aristokrati-**, 150, 37;

157, 13 (*aristokrat-*) ; **drahm-**, 36, 16 (*drakm-*) ; **Egipto**, 5, 1 (*Egiptujo*) ; **farin-**, 117, 25 (*farun-*) ; **inva-**, 10, 13 (*invad-*) ; **legion-**, 163, 3 (*legi-* en *U.V.*, tamen *legiono* aperas en "La Rabisto") ; **mum-**, 18, 22 (*mumi-*, tamen *mum-* aperas en Vortaro de Beaufront) ; **reviz-**, 80, 27 (sed *revizi-* en 190, 13) ; **sakrileg-**, 170, 40 ; 193, 34 (*sakrilegi-*) ; **skorpion-**, 103, 33 (*skorpi-* en *U.V.*) ; **tombi** anstataŭ **fali**.

Vortoj, kiujn kelkaj amikoj jam traktis, kiel *novajn*, tamen troveblaj en konataj lokoj, tial la respondeco ne restas ĉe la nuna tradukinto. Ekzemple : **ekscelenco** staras en *Universala Vortaro* ; en *Fundamenta Krestomatio* kaj en diversaj vortaroj ni trovas : **audienco** (*F.K.* 99, 29 ; 103, 26) ; **automate** (*F.K.* 131, 25) ; **faraono** (*F.K.* 353) ; **sarkasma** (*F.K.* 84, 22) ; kaj en la *Wörterbuch Esperanto-Deutsch* ni trovas *alarmo*, *antagonismo*, *apliki*, *asisti*, *asketo*, *aspekto*, *autentika*, *avangardo*, *breco*, *ekonomo*, *eskorti*, *halucinacio*, *hidraulika*, *horoskopo*, *invadi*, *kabalo*, *kariero*, *krizalido*, *malakito*, *nektaro*, *obelisko*, *orta* (de kiu : *ortangula*, *ortilo*), *paniko*, *papiruso*, *pioco*, *portiko*, *revizio*, *rezigni*, *satrapo*, *silueto*, *socio*, *soseo*, *tabureto*, *tamarindo*, *teritorio*, *togo*, *unika*, *verando*.

Ni sopiras al la dua volumo.—A. E. W.

The International Language. By W. J. CLARK, M.A. (Oxon.), Ph.D. (Leipzig), *Licencie-ès-Lettres, Bachelier en Droit (Paris)*. 205 pp. Long Primer. Price 2s. 6d. net. Published by J. M. Dent.

In these days of progress many volumes must necessarily pass unnoticed, but we are glad to note that the above work has been very favourably—as well, of course, as unfavourably—reviewed by our contemporaries. Issued under independent auspices, the book will do much to attract the intelligent public to the consideration of the international language problem. The book appeared just at the opening of the Cambridge Congress. The scope of the work is great, and the author has thoroughly probed his subject, and we recommend our readers to possess the volume. The style is interesting, convincing and breezy almost to unconventionality. One suspects the author of more than a passing acquaintance with life on the other side of the herring pond. First, treating the theme in the abstract, utility and practice are dealt with in turn. Thence, in logical sequence, the pros and cons are disinterestedly considered, with the inevitable conclusion that a solution is imperatively called for, and that Esperanto holds the field. A succinct grammar and synopsis of *La Lingvo* precede a rather long but nevertheless interesting allegory in parallel columns.—H. B. M.

The "Word of the Cross" in Esperanto.—Mr. H. M. Reade, 39, Cromer-street, Leicester, has distributed about 5,000 copies of the "Word of the Cross," translated into Esperanto, among the delegates assembled at the third International Esperantist Congress at Cambridge. The little Gospel messenger was readily accepted, and was much appreciated by the delegates.—*Christian*.

Aliaj Novaj Verkoj ricevitaj, krom tiuj signitaj per steleto en Prezaro.—*Moralna Edukado de la popola infano*, de S-ino Baronino de Ménil (en la lingvoj franca kaj Esp.), kun multaj fotografaĵoj, 1s., 0·50 Sm. ; *Senkompara Regiono por Turistoj* (North-Eastern Railway Company's Guide, Esp. and Engl.), ilustr. gvidlibro, senpage ĉe The Chief Passenger Agent, Department A, N.E. Railway, York ; *Skotlanda Pejzaĝo*, ilustr. gvidlibro, 6 pencej, 0·25 Sm., ĉe Higbie kaj Ko., Rothesay, Glasgow ; *La Departamento*

Ain (*Francujo*), ilustr. gvidlibro ; *Le Veley*, ilustr. gvidlibro, ĉe Presejo Peyriller, Rouchon et Gamon, 23, Boulevard Carnot, Le Puy (*Francujo*) ; *Du Mirindaĵoj* (*Le Mont St. Michel et L'Esperanto*), ilustr. gvidlibro, 0·75fr., ĉe Elie Galard, 24, Rue de Brissac, Angers (*Francujo*) ; *An Experiment in Esperanto*, being reprint of the remarkable articles written by a learner which appeared in *The Auckland Times*, by Rev. W. J. Wingate, price 1d. ; *Akcia Kompanio Consett Ferofabrika* (Consett Iron Company, Consett, Durham), Katalogo, Esperanta eldono ; *La Episkopo de Londono pri Misioj al la Judoj*, ricevebla ĉe 58, Bodney-road, Hackney, London ; *La Parolo de la Kruco*, senpage ĉe H. M. Reade, 39, Cromer-street, Leicester ; *Knabina Kolegio en Saumur*, ilustrita prospekto de Akademio de Rennes, Saumur, Francujo ; *Wat is Esperanto?* door H. Blok, prijs 5 cents, ĉe Unua Amsterdama Societo Esperantista ; *Lernolibro de la natura Stenografio Gabelsberger*, alfarita al Esperanto de G. Christoffel, Brunsvigo ; *Doce Lecciones del idioma Esperanto* de Grupo Espista de Montevideo, 50 centavos (990 Sm.) ; *Die Weltsprachen-Bewegung*, von Dr. W. Borgius, 0·40 Sm. ; *Por la dua Haga Konferenco* (opinioj, projektoj, propoj), elektita farita de la Internacia Instituto de Paco, tradukis R. Laisney kaj Gaston Moch, 0·50 Sm,

Filipina Esperantisto (Aŭgusto).—Ni akomas plezure tiun ĉi unuan numeron de monata gazeto el la Filipinaj Insuloj (Philippine Islands). La naskiĝo de nova gazeto estas ĉiam por ni fonto de ĝojo, precipe kiam ĝi okazas en malproksima lando orienta, ĉar tio montras, ke la disvastigado de nia lingvo ne estas limigita per Eŭropo sola, sed, ke ĝi grade ampleksas la tutan terglobon. La ĝeneralaj aspektoj kaj formo de la gazeto ne senkreditigis ian landon, kaj ni korege gratulas niajn amerikajn samideanojn pri ilia entrepreno. La gazeto estas la oficiala organo de la *Philippines Esperanto Association*, kaj estas sendata senpage al ĝiaj anoj. En tiu ĉi numero troviĝas mallonga klarigo de la gramatiko, komenco de serio da lecionoj kaj kelke da bonaj ekzemploj kun hispana traduko, ĉar, kompreneble, la hispana lingvo estas tre parolata inter la filipinoj. Troviĝas rubriko por korespondado.—G. C.

Finna Esperantisto (N-ro 5a, Aŭgusto).—Tiu ĉi estas skribmaſine skribita. Ĝi havas 4 paĝojn, kaj ĝia enhavo estas plejparte pri lokaj aferoj. Ni esperas, ke ĝi baldaŭ pligrandiĝos kaj aperos sub preslitera formo.—G. C.

Hawick.—A class has been started at the Teviot-grove Academy. Instructor, Mr. R. Miles. Apply to the hon. sec., Mr. R. Miles, 8, Village, Hawick.

Leith.—A class for beginners has been commenced in Leith (St. Paul's Church Hall) and thirty persons have joined. The teacher is Mr. James Robbie, of the Edinburgh group, and he is hopeful that as a result of the class an independent group may be formed in Leith early next year.

WALES.

Abergavenny.—The group here has been affiliated to the B.E.A. *Koran bonrenon!*

Rhos (North Wales).—The group here held its annual meeting on Tuesday evening, September 10, and a good number of members and new recruits were present. Mr. G. Meirion Griffith gave an interesting account of the Congress, and said that he was more certain than ever of the practicability of Esperanto and confident of its ultimate success. Mr. Griffith was unanimously re-elected president for the coming year. Mr. David Thomas was appointed hon. sec.

Wrexham.—Through the labours of Mr. G. Meirion Griffith, F.B.E.A., a very promising group has been formed here. Wrexham is the metropolis of North Wales and it is anticipated that the formation of a group there will be greatly for the benefit of our cause. Mr. J. Stanford, a prominent member of the Town Council, is very much interested, and has kindly consented to become the president. The secretary, Mr. R. W. Hughes, 1, Hope-street, will be pleased to give his attention to all inquirers. The group is now affiliated to the B.E.A.

RECENT LECTURES.

September 9.—LEYTON. The Socialist Society, at the "Beehive" Café, High-road. Mr. F. Watters lectured, Mr. Chas. T. Quinn presiding. As a result a class was formed and is making good progress under Mr. Watters's tuition.

September 12.—NOTTINGHAM. Public meeting in the Friends' Meeting Room. Mr. F. G. Rowe and other Nottingham *samideanoj*. Very good attendance. Audience much interested.

September 22.—COLNE. United Congregational Society. Mr. W. B. Currie, of Burnley.

September 25.—EDINBURGH. At the Pan-Celtic Congress. Mr. J. M. Warden, F.B.E.A., in English, and Mr. J. W. D. Kirkland, S.S.C., in French. The Congress gave its official approval of Esperanto.

September 25.—READING. Denmark Hall. Lecture by Mr. Arthur C. Boorman, A.C.I.S., secretary of High Wycombe Society. Keen interest aroused, and as a result of the lecture local society formed.

September 27.—BELFAST, at the Misses Foster's Ladies' Collegiate School, Balmoral. Rev. Wm. M'Kean, D.D., ex-Moderator of the General Assembly, presided. Rev. George Macloskie, LL.D., of Princeton University, U.S.A., spoke on Esperanto and his experiences at the Cambridge Congress. At the close the Doxology was sung in Esperanto by a number of the young ladies, under the leadership of Miss Foster.

September 29.—LONDON. Brixton Discussion Forum Raleigh College Hall. Mr. Isaacs, of the Brixton Group, opened a debate on Esperanto, but found only one opponent. Dr. Barber Smith, Mr. A. J. Hulme and others also spoke.

October 1.—BUXTON. Mr. Sydney Taylor, B.A., and Mr. J. A. Lees.

October 2.—EDINBURGH. In Lothian-road School. Colonel Pollen, at the opening of the session of the Edinburgh Esperanto Society. Large attendance; 130 members enrolled. Mr. Fournier d'Albe, Dublin, also addressed the meeting.

October 5.—BIRMINGHAM. Friends' Institute, Moseley. Mr. W. C. Amery. Literature sold and recruits for classes obtained.

October 7.—EDINBURGH. Queen's Hall. Mr. A. Christen, F.B.E.A. Chairman, Dr. J. Edward Parrott. Nine hundred to 1,000 persons present; 350 books sold. Nearly 200 students for week's course of lessons.

October 10.—LONDON. The Lyceum (Ladies') Club, 128, Piccadilly. Mr. D. H. Lambert, B.A. There was a fair attendance, and the greatest interest was shown in the subject. A group will probably be formed.

October 10.—BLUNDELLSANDS, near Liverpool. Dr. Sydney Whitaker. Mr. George F. Karck in the chair. About 150 were present and many books were sold.

October 10.—WAKEFIELD. At the Social Institute. Mr. W. Thistletonwaite, Mr. C. F. Welby presiding. A small but interested audience.

October 13.—NOTTINGHAM. Before the Cosmopolitan Debating Society. Mr. F. G. Rowe.

October 15.—NOTTINGHAM. Before Society of Free Speakers. Mr. F. G. Rowe.

October 16.—BIRMINGHAM. The Railway Institute. Mr. W. C. Amery. Railwaymen of all grades represented. Chairman, Mr. J. Squires, New-street station-master.

October 19.—PORTSMOUTH. Gosport-road Schools, Fratton. Before the Portsmouth and District Certified Teachers' Association. Dr. W. J. Clark, M.A. Attendance about 100, nearly all school-teachers. Keen interest. Small stock of literature sold out.

October 21.—SHEFFIELD. Société Française. Mr. J. G. Bunney.

October 21.—GLASGOW. Elgin-place Congregational Church Young Men's Union. Mr. Ernest G. Smith, M.A., LL.B. Rev. Ambrose Shepherd, D.D., was present and spoke favourably. A German *samideano*, Mr. Luyken, also spoke. Audience about 120.

October 22.—EPWORTH (Lincs.). Mr. Stephen Parker. Audience about 60. Group formed, Mr. Wm. Snowden becoming instructor and secretary.

October 23.—BURNLEY. Literary and Philosophical Society. Rev. J. Morgan Whiteman. Lecture very well received and discussed until a late hour.

October 25.—MERTON ABBEY, London, S.W. Singlegate Schools. Mr. Herb. F. Höveler, Mr. J. Blaikie, M.A., Mr. Pitt, and M. Paul Blaise addressed the meeting, mainly composed of teachers. A class was formed, nearly 30 giving in their names. It will meet every Tuesday evening at 7, at the "Propagandejo," in a room kindly put at its disposal by Mr. Höveler. M. Blaise will be the instructor.

AL LA PLIBONIGEMULOJ.

Lasu la lingvon, kia ĝi estas !
Ne "plibonigu" ĝin peno kritika !
Kvankam terminoj dubaj eĉ restas,
En si mem estas ĝi do fortika.

Sed konstruajon daŭre skuante
Fine alvenos per vi la momento,
Kiam pro viaj batoj tremante
Gi ŝanceligos ĝis fundamento !

Pensu, ke lingvo estas vivanta
Inter la homoj ; pro tio ĝi devas
Esti uzata de ili, kreskanta
Laŭ la bezono—ne kiel vi revas !

Lasu la lingvon—taŭga ĝi estos,
Kiel ĝi taŭgas jam por iu celo :
Certe, nur tial forta ĝi restos,
Car forta gardos ĝin nia fidelo !

L. E. MEIER (*München*)

El *Lingvo Internacia*.

NASKIGO.

BOORMAN.—La 20an de Oktobro, ĉe "Dover-court," Priory-avenue, High Wycombe, al S-ro Arthur Charles kaj S-ino Elizabeth Boorman—filino, baptonomata Katherine Espero.

VIZITO AL KINGEGAN,
LA RENKONTEJO DE LA NOVA KAJ MALNOVA
MONDOJ.

*Verkis lia Mošto JAMES WICKERSHAM, juĝulo
de la Unuigitaj Ŝtatoj Amerikaj por la
distrikto Alaska.*

*Esperanten tradukis RICHARD H. GEOGHEGAN,
en Fairbanks, Alaska.*

(Vidu pđ. 156, Julia No.)

La *kozga* aŭ dancejo estas loko de kunveno por la viroj; la virinoj neniam apudestas tie escepte tiam, kiam oni invitas ilin al dancado, festeno aŭ alia publika ceremonio. En Kingegan estas du dancodomoj, unu en ĉiu ekstremajo de la vilago. Enirinte la ĉefsalonon tra pordo vertikala, kaj malsupren paſinte tri kvar ŝtupojn, vi vin trovas en granda arkaja ĉambrego, kvardek futojn longa kaj dek-du futojn larga. La superkonstruo estas el ripoj de baleno, superarkitaj per grandaj glacitavoloj detiritaj de la marbordo. Jen estas sidejaro, jen bretoj por kelkatempa provizajo. Ĉe la malproksima fino de la longa salono, malsupren faletirante ankoraŭ unu du ŝtupojn, la gasto envenas malaltan malluman koridoron, ĉe kies finiĝo li rimarkas rondan malfermajon, rekte super la kapo. Sin levinte, li konstatas, ke la kapo kaj ŝultroj enestas ĉambregon kaj, uzante kiel ŝupon balenan vertebron povas, sidante sur la plankon, sin levi en la *kozga'n*. Tiu ĉi ĉambro estas kvadrato de dudek kvar futoj, kun tegmento, en kies mezo lokiĝas granda bela superkapa fenestro fokintesta.

La *kozga* estas vere dediĉita al la viroj; ĝi estas por ili klubo, metiejo, vetyludejo, gimnastikejo, teatro—en unu vorto, la sola domo de publika kuniĝo pri kiu povas fieriĝi la vilago, kaj ĝi estas pretigita kaj subtenata de la komunumo. Eniru tage kaj vi vidas ĝin plenegan de viroj; jen iu, kiu skulptas rosmardenton, jen alia, kiu flikas glitveturilon aŭ fiškaptilon, jen tria, kiu tondas al kunulo la hararon. Laŭ kutimo eskima oni fortondas la harojn de verto kaj lasas ilin ĉirkaŭ la bazo de la kapo resti longaj, por ke, dum la verto ne estas tro varma sub la kapuço, la longa frango ĉirkaŭ la malsupra parto servu por gardi la vizagon, kolon kaj oreojn kontraŭ la frosta malvarmo.

Tiu grupo apud la granda platlampo, plena je fokoleo kaj brilestanta de varmo kaj lumo ĉe la meco muska, sin gajgas per la tre konata amerika kartludo *poker* vetbatalante kapsulojn, kartocojn, elektitajn pecojn de eburo, aŭ felojn de urso aŭ de vulpo, laŭ la turnigo de karto. Alia penoge elfrotas skulptajon: *labredon* (ornamajon portatan en truo tra la malsupra

lipo) aŭ kuleron el la malmola kaj krevema jado blanka aŭ verda—ŝtono multekosta trovata en la riveroj, kiuj fluegas de oriente en la markolon Kocebuon (*Kotzebue Sound* [saünd]). Ĉiuj diligenteras je siaj diversaj laboroj, ĝis iu proponas ludon de “alten piedbati.” Tiam ekkomenciĝis la amuzajo! Oni pendigis ruleton da drapo ses futojn alte de la planko, per ŝnuro falanta de la plafono, kaj unu ĉeestanto post alia malantaŭen paſinte, balancis sin sur unu kruro, antaŭen saltetis, supren saltis, kaj alcelis la pilkon per ambaŭ piedoj. Iom post iom oni plialtigis la celajon, sed kelkaj sukcessis batii la ruleton per ambaŭ piedoj eĉ tiam, kiam ĝi pendis sep futojn super la planko. Poste, ŝnurego estas streĉita kaj sur ĝi la lertuloj prezantis laŭvice farojn de forto vere mirindajn. Dum ĉiuj ĉi atletajoj, la konkursantoj estis nudaj ĝis la zono kaj la bronzetaj haŭtoj facile elmontris la glore ekzercitajn muskolojn.

Cetere, la societaj funkcioj en la *kozga* estas la plej interesaj okazoj de la hejma vivo. Ni estis invititaj de Okbaok, la junu ĉefulo, ĉeesti akcepton oferitan de la *sojituak*, la korpuso de tamburistoj, al iliaj amikoj. Suprenpuſinte la kapojn tra la plankon, ni kun miro nin trovis rigardantaj grandan ŝtonan lampon, la malantaŭ ĝi ordigitajn tamburistojn, kaj post ili vicon de kantantoj, ĉiuj senvestaj ĝis la umbilikoj. Bronzaj sultroj plenigis la *kozga'n*, kun la escepto de malgranda spaco malantaŭ la muzikantaro, kie estis rezervata por ni la sidejo de honoro. Neokupata estis la muro okcidenta, sed en ĉiun alian colon da spaco enpremis la eminentularo de Kingegan. Tuj kiam ni sidiĝis, la tamburoj elsonoris, kanto sin levis agorde, kaj la balo estis malfermata.

Ciu rigardo algluiĝis al la enveneja truo en la planko kaj, antaŭ ol elĉesis soni la unua pulmoplenero da kanto, aperis eskimo, en bela vesto el la makulata felo de norda cervo, sekvata de sia egale belornamita edzino. Turnante la vizagojn ĝis la tamburistoj kaj aŭdantaro, ili komencis kanton de saluto gratula, akcentante per danco la akton de la muziko. Sendube ili estis modeloj de la modo, ĉar lia *labredo* formiĝis el rondajo de plado porcelana kun granda blua perlo en la mezo, kaj la bluaj strioj sur sia mentono tatuataj krevigis de envio la korojn de la alestanta sinjorinaro. Dum la kanto kaj danco plivarmiĝis, admiranto atleta kaj laŭvoĉa forsaltis en la lokon apud ili kun la bronzaj brakoj muskolaj svingantaj laŭ la ritmo muzika, kaj rakontis fanfarone me la laŭdojn de la gedandoj dancantaj. Du mal-longajn kantojn kaj dancojn—kaj la unua paro cedis la plankon, sin detrante al la muro okcidenta, kie ili ripozis; li, demetinte la suprajn vestojn, sur la alta benko, kaj ŝi sur la planko. Alia danco kaj kanto, kaj alia dancanta paro;

ankoraŭ alia, fojon post fojo, ĝis dudek paroj el la alta societo de la ĉefurbo eskima estis dance akceptitaj. Tiam la muziko ĉesis kaj la tamburistoj kaj kantintoj, sin levinte, detiris de sub la seĝaro patojn kaj kaldronojn da elektitaj manĝotajoj—haŭto de blanka baleno, viando de rosmaro, frostigita *tomkodo*, lumbajo de norda cervo kaj aliaj frandajoj de la nordolando, kiujn ili pasigis al siaj amikoj. La festeno komenciĝis ĉe lia moŝto sur la alta benko, kiu, fininte la manĝon, pasigis la restajojn malsupren al la belulino sur la planko; tion, kion si ne uzis, si konservis por hejmen porti. La paro, kiu envenis unua, tiam prenis dance la forpermeson, kaj tiel intersekve ĝis la lasta estis elirinta laŭ la ordo de sia enveno. Tiel pasis nia unua akceptado en Kingegan.

La markolo de Beringo estas larga nur kvindek mejlojn. De la nivelo de la maro apud Kingegan, ian ajn belan tagon, oni povas klare ekvidi la Orientan Promontoron (*East Cape*, [ijst kejp]) de Siberio kaj la insulojn Diomedajn; tiuj ĉi ŝajnas esti nur du tri mejlojn for de la marbordo kvankam, en efektiveco, ili kuſas meze de la kanalo. Nenia loko estas pli interesa por la studanto de amerikana etnologio, ol tiu ĉi mongola transirejo. Per vojaĝo, somere nur unutaga, la flavhaŭta, nigran dikan senbuklan hararon portanta, senbarba mongolo povis transiri tiun ĉi mallargan akvarajon kaj liveri al Ameriko senhoma la elementon homplenigeman. Tion li efektivigis ĉirkaŭ la dudek-dua tago de Junio antaŭ jam kvin mil jaroj. La unuan komercon inter la malnova mondo kaj la nova oni traktis tra la vilaĝoj eskimaj apud Kingegan, la insuloj Diomedaj kaj la Orienta Prömontoro; ĝi ankoraŭ floradis tiam, kiam la rusaj kozakoj atingis tiun regionon en la jaro 1711a. Starante sur la rando de la tero firma du mejlojn malproksime de Kingegan, mi rigardis ravita grandan oceanan riveron da glacio, norden kuregantan en la marojn ĉirkaŭpolusajn. Tiel malproksimen kiel povas atingi la okulo, la fluo antaŭenportadas, inter Kingegan kaj la Diomedinsuloj, vastajn tabulojn kaj amasojn da glacio multpeza. Sur tiu glacikampego la enlanduloj ĉasas la fokojn kaj, portante malgrandan, pezan neĝoŝuon, povas transiri multajn pecojn de glacio kiu ŝajne estas tro maldika por subteni la pezon de ia homo. Sur tiu flosajo ili ja ofte faris vojaĝojn nevolontajn inter Azio kaj Ameriko. Dum ni estis sur la promontoro, enlandulo estas elſirita el tiu ĉi glacivero, kaj ĉiuj certigis nin, ke li sendifekte aliris la Diomedajn aŭ la Orientan Promontoron. Dum la vintro de la 1892a jaro, la markolo estas stopita de naĝanta glacio kaj tute glaciigis; la homoj de Kingegan tiam transiris glitveturile al Siberio por aĉeti tabakon.

Mallonge: zorgema studado de la kondiĉoj

ĉe tiu ĉi praaga trairejo montras pruve, ke estadis ĉiam eble ke la loĝantoj de ĉiu marbordo sin atingu reciproke. Ekzistas nenia barilo al la fluo de la aziaj popoloj ameriken voje de la markolo Behringo.

La jetbastoneton de la eskimoj, ilian nacian kaj plej utilan armilon, oni uzadas de Attu, la plej malproksima el la insuloj Aleŭtaj, ĝis la plej suda ekstremaĵo de Grenlando. Ĝi estas identa kun la *atlatl*, per kiu la aztekoj jetis siajn ponardegojn obsidiene pintitajn sur la fervestitajn sekvantulojn de Kortezo; la aztekoj, kiel la eskimoj, portadis *labredojn* tra la lipoj; la *kozga* la tipa kunvenejo de la viraro eskima, estas praktike tia sama, kia la *kiva* de la sudolando; la indianoj trans la rivero Jukono parolas lingvon atapaskan tian kian la navahooj (Navajo) kaj apašoj (Apache), kaj rilatas al la eskimoj tiel same, kiel tiuj sudaj rabistoj al la aztekoj; postsignojn de la azteka glavo *macana* kaj de la moro platigi la frunton oni povas eltrovi malproksime norden laŭlonge la marbordo pacifika; kaj la jado estis trekonata, multeuzata kaj forte ŝatata de ambaŭ rasoj. Demando interesega: kiom kunhelpas tiuj ĉi frapantaj similecoj ne dividitaj kun iu gento loĝanta oriente de la Montoj Ŝonegaj (*Rocky Mountains* [roki maŭntin]), pruvi rilaton aŭ kontakton inter tiuj ĉi du mirindaj popoloj?

La monta maso, kiu formas la granitan promontoron de la Princo Kimruja havas konturon triangulan, kies ĉiu kruro de la triangulo estas longa ĉirkaŭ du mejlojn, kaj la plej okcidenta ekstremaĵo sin elſovas en la markolon Behring'an. De cent mejloj sude, dum nia veturado promontoren, ni admiris la graciforman konuson en kiu konsistas ĝia plej alta pinto, kaj ni nun preparis nin por surrampi ĝiajn murojn granitajn kaj ĝui la malofte gajnatan pejzaĝon de la supro. Tri el nia kompanio foriris el la vilaĝo tagiĝe kaj, longe deflankiginte ĉirkaŭ la bazo de la monto, ni preterpasis la antikvan enterigejon de la Kingegananoj kaj venis sur la pli altan nivelon de la monta deklivo. Suprege de tie estis facile rampo, kaj tagmeze ni staris 2,600 futojn super la marnivelon, sur la supro de tiu ŝtonamaso kie, genufleksante, la filino de Herodiaso levis vizagón senesperegan por rigardi la formon de la Vaganta Hebreo, kiu staris sur la orientazia terfino.

Nek ŝin nek lin vidis ni, filoj senfantaziaj de la jarcento dudeka, sed ni vidis ja tion, kio ankaŭ estas de nemultaj rigardebla—la mondojn novan kaj malnovan per unu turno de l' rigardo, Azion kaj Amerikon en okuljeto sola. Ni nin trovis sur tiu masego kontinenta kiu foretendas ĝis la markolo Magelana, kaj antaŭ ni kuſas tiu fratkontinentaro, kies ekstremaĵoj estas en la

malproksimegaj promontoroj de Azio, Eŭropo kaj Afriko. De la marbordo sudamerika ĝis la duoninsulo malaja, laŭ la linio de la ekvatoro, estas ĝuste unu duono de la tergloba cirklo; tie ĉi, kontraŭe, la kontinentoj ŝajnas esti disigitaj nur laŭ jeto de ŝtono. Mezkanale trankvilas la duopaj insuloj Diomedaj, stup-ŝtonoj por la migranto mongola en lia veturo novamonden. Ĝis limo suden, sunbrileante, ripozas la maro Behring'a, sur ĝia brusto helblanka insulo turkiza de l' Rego; ĝis limo norden, glacitavoloj rapidas tra vojoj bluakvaj, konkurse celante poluson, senĉese, sensfine, senhalte.

Starigante stangon inter la ŝtonegoj de la montapinto, ni malfaldis la "stelojn kaj strekojn" de la standardo patruja; laŭtavoće trifoj salutis; kaptis, ankoraŭ unu fojon, per ĉion ampleksantan rigardon, la tutajon de tiu panoramo kalejdoskopa, kiun rigardante la okulo neniam enuiĝus, kaj turnis orienten la vizaĝojn ĝis la negebenejon senliman, silentan.

"MI FORGESIS."

PROPONO POR VESTPOSA MEMORIGO

Esperantigita de HARRY A. EPSTEIN (No. 11,331).

Vi devis reveni domen pro viaj ŝlosiloj forgesitaj.

Vi devis reiri oficejon pro tiuj paperoj, kiujn vi forgesis.

Post ŝoso de via skribotablo vi devis malfermi ĝin pro tiu pakajo.

Kambio maturigas vendredon. Vi forgesas ĝin; vendredon noktomeze vi ekvekiĝas banita je ŝvito.

Vi devas telefoni al Jones je la unua, vi memoras tion je la tria.

Vi devas meti leteron en poštkeston kiam vi iras tagmezmanĝi. Vi ne memoras pri ĝi ĝis via reveno en la oficejon.

Vi renkontas Smith'on laŭavize, kunparolas kun li kaj, post via reveno, eltiras, ke vi forgesis ĝuste tion, kion vi intencis diskuti!

Ho jes, via memoro bone funkciis! Vi havas tamen tro da sensignifaĵoj por pripensi.

Rimedon kontraŭ tio? Jes! *Faru ĝin tuj!* Si vi devas elpreni libron el la oficejo, metu tiun libron nun en la poŝon.

Se vi devas porti hejmen paperon el la oficejo, metu ĝin en la poŝon je la nuna momento.

Ne prokrastu! Vi tuj forgesos la aferon kaj ĝi ne revenos al vi ĝis kiam estos tro malfrue.

Forsovu la negravaĵojn el via memoro en la memorlibron! Tiam la spirito estos libera konsideri la gravajn aferojn, kaj vi tiam ilin rememoros ĝustatempe.

LA SUPETO EL ŜTONETOJ.

Dum manovro foje venis en kvartalon militisto Tre malsata, sed sagaca, ĉe avara kamparisto. Kiu diris: — Ve, mi estas nur mizera kamparano; Pli ne povas al vi doni mi ol iom nur da pano. Se vi trinki volas... bone: tie la ĝardenrivero, Ĝi enhavas ja sufice por vi certe da akvero.

La soldato lin aŭskultas kun acida la mieno, Poste ridas kaj rediras al la mastro de bieno:

— Nu, amiko, mi neniel estos ja por vi ŝargajo, Mi nur iom de vi petas da malgranda afablajo: Vi bonvolu do alporti de ŝtonetoj nun areton, Por ke mi kuiri povu bonan la ŝtonetsupeton.

— Kion li do faros, — pensis tuj en si la kamparisto.

— En ŝtonetoj estas forto, — diris plu la militisto,

— Tre bongustan supon ili kuirite al mi donas; Mi bedaŭras, ke tro multaj tiun fakton ja ne konas.

— Ĉu vi aŭdis, edzineto, — diris nun la kamparisto,

— Vi atentu, kion faros nia brava militisto.

Diligente li kuiras la ŝtonetojn kaj ridetas; La kampul' apude staras kaj scivole alvidetas.

— Ĉu ne povus mi ricevi, mastro, iom da legomo?

Ĝi dolēigus la akrecon de la supo al la homo.

Tre volonte ĝin permisas nun la mastro de l' bieno,

Ke l' edzino tuj alportu herbojn el la dom-gardeno.

— Jam suficias... sed pli bona efektive ja, ĉe Juno,

La supeto tuj fariĝus per nur iom da faruno.

— Interesus min nur scii, — pensis nia kamparisto.

— Kion fine do ricevos tiu stranga militisto.

— Pacienco... baldaŭ estos jam necesa la kulero, Plu al mi nenio mankas nun krom salo kaj butero.

Nia kamparano diras: — Estas vera mirindajo...

Mi ĝis nun neniam aŭdis ion pri ŝtonetmanĝo.

La kuiristo-militisto ruze prenas gustoprovon:

— Nun bezonas mi nur sole de kokino unu ovon.

— Vi alportu, edzineto, unu al la kuirejo, Tuj ordonas la kampulo, — vi ja havas en kokejo.

La kuiristo ĝin enkvirlis forte; posteli tre ĝoje Gustumigis al la mastro sian supon unufoje.

Fine ĉiuj ja ŝtonetoj kune estas forjetitaj,

— Ĉar la fortoj — li klarigis, — plene estas eltiritaj.

Tiam ĝis la lasta guto mangis li kun apetito La supeton akiritan nur per lia saĝa sprito.

— Ho, edzino, — la kampulo ruze diris post la sceno,

— Vi kuiru la mangajon nun tre ofte; estas beno,

Ke — al mi neniam ŝajnis tio ĉi ĝis nun kredebla —

Tia forto el ŝtonetoj simplaj estas akirebla!

Esperantigis JOH. SCHRÖDER, VIENO (Austria).

LA HIRUNDO KAJ LA RANO.

Apud la rando de monta krutaĵo sidis rano, kiu post sia matenbano en la proksima lageto estis admiranta la belan vidajon. Tra la valo flugis hirundo, kiu, iom laca post longa matena flugado, sidiĝis apud la rano. "Bonan tagon" diris li. "Tagon" respondis la rano, iom malgentile, ĉar ĝi volis rigardi trankvile la pejzaĝon. "Kion vi faras?" diris la birdo. "Kompreneble mi ripozas, post mia plezuriga naĝado : ĉu vi?" "Mi ankaŭ, post mia insekt-kaptanta ekskurso : Ni iom babilu amike, kaj tiam vi eble revenos kun mi." "Dankojn, mil dankojn, sed mi pliamas la akvon. Venu vi, ni kunnaĝu." "Tute ne! flugante mi trarigardas la tutan mondon; sub la akvo oni nenion vidas." "Ne estas vere : mi de tie ĉi tre bone ekvidas la valon, la montojn kontraŭe, kaj ĉion : sed oni ne povas vidi la subakvajn belaĵojn, se oni ne eniras, kaj estas tie tiom da insektoj plej dikaj kaj mangebaj." La birdo ekkoleris je tiu respondo, sed nur diris : "mi ne kredas ĝin." "Ĉu vi estas timema?" diris la rano. "Mi ne" respondis la birdo "mi estas kuraĝulo sed vi timemulo : mi kredas, ke vi ne povus flugi." "Ho jes, mi ofte flugas, sed mi certigas, ke vi ne povas naĝi." "Kaj mi povas naĝi kaj pli bone ol vi," li mensoge respondis, ĉar li ne ŝatis la mokparolojn de la rano. Tiam la rano fiere ŝveligante sin, diris : "Nu, saltu en la lageton, kaj mi samtempe saltos en la valon." La birdo ne kuraĝis rifuzi la proponon, kaj diris "bone" kaj la rano ne povis retiri sian inviton kaj ankaŭ devigis diri "bone." "Do ni kriu unu, du, tri," diris la birdo, "kaj je la vorto tri ni ambaŭ eksaltos." "Unu, du, tri" ili kune ekkris kaj saltis, sed la birdo dronis sub la akvo kaj la aliaj ranoj iom post iom englutis ĝin, kaj la rano dispecigis sur la ŝtonegoj en la valo, kaj la aliaj birdoj ĝojigis pro la bongusta tagmango.

Oni ne devas ŝajnigi, ke oni povas fari ĉion, kion povas fari la aliaj.

De CLARENCE BICKNELL, el "La Esperanta Abelo," Udine (Italujo).

CORRESPONDENCE.

Al la Redaktoro de THE BRITISH ESPERANTIST.

ESTIMATA SINJORO,—Rilate al la letero de S-ro Muschamp en la Oktobro numero de THE BRITISH ESPERANTIST, mi ankaŭ havas "revon," same kiel S-ro Aymonier en *La Revuo*, sed mia revo estas multe pli ambicia, ol la lia. Gi estas pri Esperantista Kolonio ie en la mondo, t.e. vera Esperantistujo. Kredeble estas multe da homoj, kiu amus "reveni al la kampo," sed kiu havas nek la povon, hek la scion tion fari. Tial, kial la Esperantistoj ne farus modelan kolonion ie, kie ĉiuj, kiuj volas manlabori povas havi sian hejmon, veran hejmon, sur la kampo, kie li povas kreskigi siajn proprejn mangajojn, k.c. Mi pensas, ke la ideo, se bone administrata, povas doni daŭran benon al la tuta Esperantistaro. Car kredeble la legoj estos tre liberaj, ĉiuj, kiuj ne havas suficien liberecon en sia patrujo, povas veni, ankaŭ povas esti aparta kolonio de la vegetaranoj, fruktmanĝantoj, k.c., kaj kredeble la kolonio havos hotelon, kie turistoj Esperantistaj povas loĝadi.

De longa tempo mi pensas pri loko de tia kolonio, kaj mi ne povas trovi pli konvenan, ol en Kalifornio, U.S.A. La klimato tie estas sendube la pli bona en la mondo; en kelkaj lokoj neniam glaciigas, kaj tamen la someraj monatoj ne estas tro varmaj, nur en kelkaj lokoj, kien la marventeto ne povas veni. Kelke da homoj loĝadas en tendoj la tutan jaron; oni kreskigas ĉion, kio povas esti kreskigata en la meztropika regiono, orangojn, citronojn, bananojn, granatojn, k.c., kaj ĉiujn fruktojn kaj legumojn, kiujn oni kreskigas en Eŭropo.

Estas ja suficego da lando tie, kaj ĝi nur bezonas la kolonianojn. La sistemo de fondigo de komunumaro tie estas tre bona. La lando estas tenata en grandaj regionoj por la kreskigo de tritiko, sed nun estas pli multekosta kiel malgrandaj farmbienoj, fruktarbejoj, k.c. Tial sindikatoj aĉetas de posedantoj ĉirkau duonon de lia tero je malgranda prezo kaj revendas ĝin al aro da kolonianoj, kiuj devas tuj okupi siajn terposedaĵojn, kaj, post dirita tempo, konstrui domojn. Tiamaniere, la valoro de la lando altiĝas kaj la originala posedanto trovos, ke la restaĵo de lia bieno multvalorigas. Tiu estas bona sistemo por kolonio de Esperantistoj; ili povas kune aĉeti regionon je malkara prezo kaj fondi kolonion kaj urbon, kiu estos modelo por la tutaj mondo. Mi mem intencas vojaĝi al Kalifornio la venontan jaron "por esplori la landon," kaj mi nun deziras ricevi, de tiuj Esperantistoj, kiu interesigas pri mia ideo, leterojn por aŭ kontraŭ ĝin. Mi mem estas iatempe komizo, sed de du jaroj laboras sur la kampo.—Kun respektplenaj salutoj, F. FRANCIS.

Sweetsburg P.O., P2, Kanado, la 16an Oktobro.

PROVERBOJ.

UZATAJ EN GERMANA LINGVO.

Tradukis JOH. SCHRÖDER, el Vieno.

Antaŭe pripensu, poste komencu!—Kiu riskas, tiu gajnos.—Malgrandaj fiŝoj, bonaj fiŝoj!

—Sian feliĉon ĉiu forĝas mem.—Tempo venigas rozojn.—Edziĝoj fariĝas en ĉielo.—

Laboro, modereco kaj ripozo: jen kontraŭ kuracisto estas ŝlosa!—Fripono promesas pli multon, ol li havas.—Cia komenco estas malfacila.—Kie sidas kolomboj, tie alflugas kolomboj.

Kiu al alia falejon preparas, tiu ofte mem enfalas.—Pli feliĉiga dono ol akcepto.—Mano lavas manon.—Provado superas studdon.—Malrapidirante, oni ankaŭ venas celon.—Nenia rozo sen dorno.—Singardemo estas la patrino de l' sageco.—Sinjoro mem servisto estu, por ke en domo ordo restu!—Suferi maljuston pli bone, ol fari maljuston.—Se afero vin ĝojigas, tio la penon faciligas.—

BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION. CANDIDATES FOR MEMBERSHIP.

EXTRACT FROM RULES:—“If no objection shall be lodged within fourteen days, the Secretary shall inform the candidate that he is admitted as a member.”

Miss E. M. HABERSHON, L.L.A., 101, *Palmerston-road, Southsea*; Miss A. D. STOCKDALE, 56, *Cann Hall-road, Leytonstone, E.*; A. PINARD, 6, *Highbury-terrace, London, N.*; R. SCOTT, Jnr., *Dunhurst, Petersfield*; G. AZZOPARDI, c.o. *Miss Godden, Market-square, Sandwich*; C. H. BREAR, *Town Hall, Nelson, Lancs.*; Major GREENWOOD, M.D., 243, *Hackney-road, N.E.*; C. P. ISAAC, 54, *Braintree-road, Brixton, S.W.*; Mrs. L. H. S. WYLIE, *Colombo, Ceylon*; IAN H. BAILLIE, *Torvet 6, Bergen, Norway*; T. H. RIDPETH, 60, *St. Martin's-lane, E.C.*; RICHARD SHARPE, c.o. *Martin's Bank, Ltd., 68, Lombard-street, E.C.*; A. A. AUSTIN, 44, *Onley-street, Norwich*; W. TICKELL, 199, *Wingrove-avenue, Newcastle-upon-Tyne*; Rev. G. W. SHEPPARD, *Ningpo, China*; Rev. P. GOUGH, 209, *Castleford-road, Norman-ton, Yorks*; L. C. MEAD, 22, *Griffiths-road, Wimbledon, S.W.*; S. C. DE SOUZA, *Singapore*; Miss ELLEN FYSON, 54, *East-street, Taunton*; HARRY INGHAM, M.Sc., 26, *Hamilton-street, Bury*; A. H. LOCKINGTON, 68, *Adelaide-road, N.W.*; A. G. VERNON-HARCOURT, M.A., F.R.S., *St. Clare, Ryde*; CLEMENT HILL, 17, *Stockleigh-road, St. Leonards-on-Sea*; H. J. CASH, *The White Cottage, Oxted, Surrey*; W. FRANCKLIN HENRY, 26, *Vanbrugh-park, Blackheath, S.E.*; J. S. W. WARD, 50, *Robinson-street, Beaconsfield, S. Africa*.

PASSED ADVANCED EXAMINATION.

*Rev. ROBERT BOYD, *Tenterden, Kent*; JAMES ROBBIN, *Edinburgh*; *E. C. KIDDER, *Kingston-on-Thames*; *Dr. CLARA L. TODSON, *Elgin, Ill., U.S.A.*; A. RUNCIMAN, *Glasgow*; *CHAS. T. MACGREGOR, *Edinburgh*; J. B. TONER, *Rutherglen, Glasgow*; W. H. FENTON, *Blackpool*.

PASSED PRELIMINARY EXAMINATION.

*Miss RUTTER, *Cambridge*; *D. THOMAS, *Cardiff*; J. T. ROBERTS, *Chester*; *OTTO NÄF, *Mill Hill Park*; FRANK J. FREEMAN, *Reading*; CHAS. BRANDRETH, *Prescot*,

Lancs.; G. McDONALD, *Hartlepool*; JAMES WOODALL, *Manchester*; *DERWENT WHITTLESEA, *Rockford, Ill., U.S.A.*; *F. W. I. AIREY, *Fleet Paymaster, R.N.*; *JOHN WILLAMAN, *Rockford, Ill., U.S.A.*; *Rev. C. J. SENIOR, *Lillington Lovell, Bucks.*; *W. J. LEWIS, *Weaste, Manchester*; *Mrs. A. M. HART, *Srinigar, Cashmir, India*; JOHN CUTHBERT, *Glasgow*; *Rev. G. W. SHEPPARD, *Ningpo, China*; *W. A. KER, A.M.I.C.E., *Glasgow*.

* Denotes that the candidate has passed with distinction.

COUNCIL, B.E.A.

The monthly meeting of the Council of the Association took place on October 14, with Dr. Pollen in the chair. The following were present:—Misses Lawrence and Schafer, and Messrs. Cowper, Chatterton, Clegg, Eagle, Green, Maitland, Millidge, Rolston, Sexton and Southcombe.

A letter was read from Mr. G. W. Bullen, resigning his seat on the Council and his connection with the Examining and Books Committees. The Council, expressing its great regret, resolved to ask Mr. Bullen to be good enough to remain on the Council and committees until next meeting.

A hearty vote of thanks was accorded to the *Trio por la Tria* for the splendid services they had rendered to the Cause by organising the Congress. Dr. Pollen acknowledged on behalf of himself and his colleagues.

The Secretary submitted an approximate balance-sheet at September 30 last, and explained the financial position of the Association, which was shown to be highly satisfactory.

It was resolved that the typewriter which had been so ably used by Mr. Wackrill in connection with his work as editor of the gazette in 1906, and as member of various committees, should be retained by that gentleman in consideration of the services he had by that work rendered to the Association.

Finally, it was decided that the two new rooms taken over by the Association, on account of the Congress, at 13, Arundel-street, should be held until December 25 next.

FAKO DE KORESPONDADO INTERNACIA. (F.K.I.)

Sub tju ĉi rubriko oni empresas malgrandajn anoncojn de tiuj el niaj legantoj, kiuj deziras korespondadi kun alilanduloj. Ĉiu anoncanto devas pagi ses penceojn (0.25 spesmilojn) por trilinia empresajo kiel sube (pli ol tri linioj po tri penceoj por ĉia komencita linio); ĉiu **MEMBRO** de l' Asocio havas la rajton fari unu empresajon senpage. *Bonvolu skribi legeble, rekte al Redakcio*.

278. **Kent (Anglujo).**—S-ro E. R. Skinner, *St. Mary Cray*, naturisto, dez. korespondadi kaj interŝangi kun kolektistoj en Rusujo, Hispanujo kaj alioke, ankaŭ aĉeti specimenojn. Specialajo: la ovoj de birdoj.

284. **Toledo (Ohio), U.S.A.**—S-ro John Bolinger *P.O. Box 999*, deziras korespondadi kun samideanoj alilandaj per poštarkoj aŭ letero.

285. **Voronej, gub. (Ruslando).**—Kuracisto A. Romanov deziras korespondadi kun ĉiulandaj kolegoj.

286. **Keighley (Anglujo).**—S-ro J. Rhodes petas pardonon de multaj estimataj korespondantoj pro tio, ke, pro laboroj je la pli granda Angla-Esperanta Vortaro, li nur povas, nuntempe, respondi la plej urĝajn leterojn.

287. **Milton (New Zealand).**—S-ro Richard Humphrey deziras korespondadi per ilustr. poštarkoj

kaj interŝangi N.Z. poštmarkojn kun alilandanoj. Ĉiam kaj tuj respondos.

288. **Chicago (Ill.), U.S.A.**—S-ro G. B. Trnka, 822, *South Ashland-avenue*,deziras korespondi kun alilandanoj per ilustritaj poštarkoj.

289. S-ro M. C. Butler avertas siajn gekorespondantojn, ke, kvankam li estas tre feliĉa laŭpove liveri kopiojn de vortoj de Esperantaj kantoj aŭ traduki jen unu, jen alian; tamen, ĉar li estas tre okupata profesie, estas tute neeble, ke li datūrigu la tradukon de kantoj senpage *pogrande*.

290. **Moskvo (Ruslando).**—S-ro A. Prager, *Arbat 51*, dez. korespondi kun eldonistoj de esperantaj. Interŝanĝas poštarkojn kaj signojn. Ĉiam respondas.

291. **Claclton-on-Sea (Anglujo).**—F.-ino Palmer, *West Holme, 63, Marine-parade*, deziras korespondi per poštarkoj aŭ leteroj kun alilandanoj.

ESPERANTO CLASSES IN LONDON AND DISTRICT.

L.C.C. EVENING COMMERCIAL CENTRES.

1. *Plough-road, Clapham Junction, S.W.* Tuesday, 7.15—9.45. Teacher, Mr. Harald Clegg.
2. *Thomas-street, Limehouse, E.* Thursday, 7—9.30. Teacher, Mr. S. Nicholl.
3. *Myrdle-street, Commercial-road, E.* Tuesday, 7.15—9.45. Teacher, Mr. G. L. Browne.
4. *Queen's-road, Dalston, N.E.* Wednesday and Friday, 7.15—9.45. Teacher, Mr. G. L. Browne.
5. *The "Ashburnham," Upperne-road, Chelsea, S.W.* Monday, 7.15—9.45. Teacher, Mr. G. L. Browne.
6. *Brownhill-road, Catford.* Monday, 7.30—10. Teacher, Mr. S. R. Marshall.
7. *The "Oliver Goldsmith," Peckham-road, Camberwell, S.E.* Tuesday, 7.30—10. Teacher, Mr. S. R. Marshall.
8. *Choumert-road, Peckham, S.E.* Wednesday, 7.15—9.45. Teacher, Mr. S. R. Marshall.
9. *"The Hugh Myddelton," St. James'-walk, Clerkenwell-green, E.C.* Friday, 7—9.30. Teacher, Mr. S. R. Marshall.
10. *Blackheath-road, Greenwich, S.E.* Thursday, 7.15—9.45. Teacher, Mr. S. R. Marshall.

OTHER CLASSES.

11. *London Esperanto Club, St. Bride's Institute, St. Bride's-lane, Ludgate-circus.* Friday, 7—9. Classes formed as required. Debates in Esperanto, 8.30—9.30. Dramatic Circle, 14, Norfolk-street, Strand, every Friday at 6.30. Director, AD. SCHAFER.
12. *Northern Polytechnic, Holloway-road.*—Thursday, 7—10. Elementary and Conversational. Teacher, Mr. G. L. Browne.
13. *Working Men's College, Crowndale-road, St. Pancras, N.W.* Monday, 7.30. Teacher, M. E. Privat.
14. *"Manorside," 18, Leigh-road, Highbury, N.* Monday, 7—9.30. Instructor, Mr. M. C. Butler.
15. *"Norda Stelo" Esperanto Society, Holloway Hall, Holloway-road, N.* Wednesdays, conversational practice only, 7.
16. *Cusack Institute, White-street, Moorfields, E.C.* Friday, 7—8.
17. *Stepney Esperanto Group, Borough Reference Library, Bancroft-road, Mile-end, E.* Wednesday, 7.30—9.30.
18. *Eustace Miles Restaurant, Chandos-street, W., The Salon.* Tuesday afternoons, 3.30. Instructor, Mr. A. Blott.
19. *Islington Social Democratic Party, 231, Liverpool-road, N.* Wednesday, 8.15. Instructor, Mr. George Wallace.
20. *Kilburn Unitarian Church, Quex-road, N.W.* Names should be sent to Dr. W. Winslow Hall, 5, Birchington-road, Kilburn. Instructor, Mr. J. C. Wilson.
21. *Latchmere Baths, Latchmere-road, Battersea.* Every Wednesday evening at 8.0. Conversational practice.
22. *Brixton Esperanto Group, 59, Brixton-hill.* Tuesday, 8—9.30.
23. *Deerhaddnn College, 59, Brixton-hill.* Private Classes, Mondays and Thursdays, 8. Instructor, Miss E. C. Walker.
24. *Streatham, 163, Knollys-road, S.W.* Miss E. Taylor. Particulars on application.

25. *Finchley (N. London).* For particulars apply to *Miss Chater, Hertford Lodge, Church End, Finchley, N.* Instructor, Mr. M. C. Butler, L.R.A.M.

26. *Buckhurst Hill, Essex.* A class is held every Tuesday, at 8 p.m., in Princes-road. Apply to *Miss Stacy, "Woodthorpe," High-road, Buckhurst Hill.*

27. *Wanstead, Essex.* An Elementary and an Advanced class are held every Wednesday, at 7.30 p.m., at *"Verda Stelo," 57, Gordon-road, Wanstead.* Apply to Mr. S. Nicholl, at above address.

28. *Leytonstone.* Classes for juniors and seniors are held every Monday, at 7 to 9.15 p.m., at *Leytonstone College, 4, New Fillibrook-road.* Apply to Mr. S. H. Farnes, 141, Walwood-road, Leytonstone.

29. *Leyton.* Every Thursday evening, at 8.15 p.m., at *"Bee Hive" Café, High-road.* Apply to Secretary, Mr. W. A. Narbeth, 465, High-road.

LONDON ESPERANTO CLUB.

Discussions on the undermentioned subjects will be held during November:—

November 1.—“What is Beauty?” Mrs. SHEEHAN.

November 8.—“The Organisation of Open-Air Esperanto Meetings in the Parks next Summer.” Mr. MEULEN.

November 15.—“Are we the victims of our emotions?” Mr. NICHOLL.

November 22.—“Should we put the clocks forward an hour and rise earlier?” Mr. ETCHELLS.

November 29.—“The Basis of Individualism.” Mr. HARDING.

A prospectus of the Club and a copy of the rules of the Club can be obtained on application to the Hon. Secretary, H. CROXFORD, 32, Castelnau-gardens, Barnes, S.W.

LECIONETO PRI LA TEMPOJ!

Ho, miaj lernantoj! Kia nekredebla konfuzo! Vi ja ĉiam ankoraŭ intermixas hodiaŭ, hieraŭ, morgaŭ kaj antaŭhieraŭ kaj postmorgaŭ. Atentu do! Hodiaŭ estis hieraŭ morgaŭ kaj antaŭhieraŭ postmorgaŭ kaj estos morgaŭ hieraŭ kaj postmorgaŭ antaŭhieraŭ. Hieraŭ estis hieraŭ hodiaŭ kaj antaŭhieraŭ morgaŭ kaj estos morgaŭ antaŭhieraŭ. Morgaŭ estis hieraŭ postmorgaŭ kaj estos morgaŭ hodiaŭ kaj postmorgaŭ hieraŭ. Antaŭhieraŭ estis hieraŭ hieraŭ kaj antaŭhieraŭ hodiaŭ. Postmorgaŭ estos morgaŭ morgaŭ kaj postmorgaŭ hodiaŭ.

Ĉu tio ne estas tute facile komprenebla?

El MONDO, Berlin.

Notice is hereby given that the next Meeting of the Council of the B.E.A. (Incorp.) will be held on Monday, November 11, at the Offices, 13, Arundel-street, Strand, London, W.C., at 6.30 p.m.